

Conrad Ferdinand Meyer,
Semantodiro

tradukita de Willy Nüesch

Mezuru paŝon kun sever'!
Ankoraŭ longe junos ter'!
Jen falas grajn'; ripoz' kaj mort'.
Ripozo dolĉas. Bonas sort'.
Jen unu sinkas tra la hum'.
Ĝi fartas bone. Dolĉas lum'.
Ne falas el ĉi mondo ĝi,
Ĝi falas laŭ la plaĉ' de Di'.

*Traduko de la Germana poemo "Säerspruch" de CONRAD FERDINAND MEYER (Konrado Ferdinando Majero, *1825-10-11 – †1898-11-28) en Esperanton de WILLY NÜESCH (Etzlstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, *1927-05-09) en 2005.*

Arg-301-641 (2005-08-01 14:17:20)

Conrad Ferdinand Meyer,
Semista diro

tradukita de Manfredo Ratislavo

La paŝojn, ĵetojn taksu vi!
La ter', ankoraŭ junas ĝi!
Mortonte falas ien gren'.
Ja bonas! Estos ĝi sen pen'.
Rompiĝas greno tra la ter'.
Ja bonas! Dolĉas la aer'.
Ne falas el la mondo iu.
Laŭ Dia plaĉo falas ĉiu.

*Traduko de la Germana poemo "Säerspruch" de CONRAD FERDINAND MEYER (Konrado Ferdinando Majero, *1825-10-11 – †1898-11-28) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04).*

MR-062-1 / Arg-301-609 (2013-10-06 15:40:21)